★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Tuberkulozo

**Prelegos:** Oldřich Arnošt Fischer

Inter bakterioj estas grupo de bakterioj, kies korpoj estas protektitaj per dikaj vaksaj ŝirmkovraĵoj. Pro tio ili rezistas acidajn fluidaĵojn. Ilia komuna nomo estas mikobakterioj. Medicine signifaj estas precipe kaŭzantoj de humana tuberkulozo (*Mycobacterium tuberculosis*), bova tuberkulozo (*Mycobacterium bovis*), birda tuberkulozo (*Mycobacterium avium avium*), paratuberkulozo de remaĉuloj (*Mycobacterium avium paratuberculosis*) kaj lepro (*Mycobacterium leprae*). En pasinteco humana tuberkulozo kaŭzis malsanojn kaj mortojn de miliardoj da homoj. Ĝis nun ĝi endanĝerigas precipe tiujn homojn, kiuj suferas de militoj, mallibereco kaj nutromanko. En eksa Ĉeĥoslovakio la 10-an de oktobro 1968 bestkuracistoj bovan tuberkulozon eliminis. Birda tuberkulozo kaj paratuberkulozo kaŭzas ekonomiajn domaĝojn. Ĉu oni kapablas tuberkulozon kuraci? Kiel oni povas defendi sin kontraŭ tuberkulozo?
Ĉeesta programo, ne estos elsendata rete. Ĝi estas registrota.
**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 30-an de novembro 2022 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- 29 de julio — 5 de aŭgusto 2023 Universala kongreso, Torino, Italio
- 5 – 12 aŭgusto 2023 Kongreso KELI, Bjalistoko, Pollando
- **Arboj kaj Arbedo**j nova libro de Oldřich Arnošt Fischer pri naturo. Ĝi estos aĉetebla de la aŭtoro post la prelego.

★

## Programo en decembro

La 7-an **Advento, kristnasko kaj nova jaro –** komuna renkontiĝo kun PEA Gliwice**,** rete per Zoom
La 14-an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, Občanský klub, Hybešova 65a
Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por januara kaj februara programo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto